# *Kubaj laboristoj esprimas solidarecon kun la venezuela popolo*



**Foto: PL**

Havano, a?g 28 (RHK) La Kuba Laborista Sindikato (CTC) kaj ?iaj Naciaj Sindikatoj esprimis hodia? sian solidarecon kun la venezuela popolo fronte al amaskomunikila manipulado, kiu celas anta?enigi internan malstabiligon kaj perforton en la sudamerika lando.

En deklaro, la ento esprimis sian subtenon al la Bolivarana Socialista Laborista Centralo (CBST), dum ?i kondamnis la agojn anta?enigitajn por "mallegitimi la bruegan venkon de la prezidento Nicolás Maduro kaj la Granda Patriota Poluso en la elektoj de la 28-a de julio".

La CTC emfazis, ke la Nacia Balota Konsilio kaj la Supera Kortumo aprobis la balotrezultojn kiel signon de strikta observado de konstitucieco.

"Kubaj laboristoj estas plene konvinkitaj, ke neniu povos venki la volon de la venezuela popolo, kiu triumfis demokratie ?e la balotoj", substrekas la deklaro.

Tial, precizigas la teksto, la CTC malakceptas la artikuladon de misgvidaj matricoj, per sociaj retoj kaj aliaj platformoj, por instigi malamon kontra? bolivaraj institucioj, gvidantoj kaj a?toritatoj.

"Ni certas, ke ne estos amaskomunikilaro a? intervena kampanjo kiu subfosos la genlinion de la kura?a venezuela popolo kaj ties laboristoj, kiuj havas la legitiman rajton defendi sian suverenecon kaj memdeterminadon", substrekas la dokumento.

La kubaj laboristoj reasertis sian senliman subtenon kaj akompanon al la venezuela popolo, la CBST kaj la prezidento Nicolás Maduro, "dignaj heredantoj de la humanisma kaj sendependisma penso de (Simón) Bolívar kaj (Hugo) Chávez".

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/363890-kubaj-laboristoj-esprimas-solidarecon-kun-la-venezuela-popolo

**Radio Habana Cuba**